



Loĝanto de Afrino kun skatolo de la Turka Ruĝa Krescento la 19-an de marto

ŜANĜANTE AFRINON PERFORTE

Pasintan 14-an de marto, la turka armeo kune kun ĝihadismaj grupoj okupaciis la roĵavan urbon Afrinon kaj kelkajn ĉirkaŭajn vilaĝojn kaj okazigis situacion, kiun oni povas konsideri homa katastrofo. Kiel denunciis la kurdaj reprezentantoj, tio havas perversan celon: ŝanĝi la demografion de tiu teritorio.

Laŭ la prezidento de la afrina aŭtonoma administracio Hevi Mustafa, oni forfuĝigis pli ol 200 000 personojn el la okupaciitaj teritorioj, kaj oni kalkulas, ke aliaj 150 000 restis kaptitaj en siaj loĝlokoj. Sed post tiu amasa delokigo de la loĝantaro estas alia politika intereso pli strategia; ne temas nur pri konsekvenco de la milita situacio. La ĉefa celo de Turkio estas efektivi la delokigon de tiu loĝantaro kaj repopoli tiun landliman teritorion per nova loĝantaro, kiu estu "fidinda" por la turka ŝtato. Mustafa resumis tiun lastan celon: "Oni volas forlasigi Afrinon kaj ties ĉirkaŭaĵon al ĉiuj loĝantoj. Tio rilatas al la asimiladpolitiko, kiun Turkio disvolvas kontraŭ la kurdoj; ĝi agadas kurdofobie." Li aldonis ankaŭ la jenon: "Simile, oni volas malfortigi nian demokratian projekton, kaj stimuli sektisman konflikton inter ĉiuj homkomunumoj cele al pliakrigo de la krizo kaj al la divido de Sirio."

En la distrikto de *Xahba*, apuda al Afrino kaj kies teritorion ankoraŭ kontrolas la Siriaj Demokrataj Fortoj⁽¹⁾, 200 000 rifuĝintoj provizore intaliĝis, kaj ili estas en stato de grava homa krizo. Laŭ la informoj donitaj de la aŭtonoma administracio, tiuj personoj ne havas sufiĉon da bazaj vivnecesaĵoj.

La delokigitaj familioj instalas sin en diversaj domoj, damaĝitaj de la bataloj kaj atakoj, kaj ankaŭ en aliaj provizoraj loĝlokoj. Plilongiĝas la listo de infanoj mortintaj pro la minoj kaŝitaj de la teroristoj, same kiel tiu de la mortintoj pro subnutrado. La Kurda Ruĝa Krescento⁽²⁾ helpas laŭpove, sed ne estas multe pli.

Mustafa diris, interalie, ke mankas bazaj kuraciloj kaj sanitarekipaĵo. "Ni komencis ree instrui en la tendoj, sed mankas ĉio, kaj multaj lernantoj simple ne iras al la instruado." Kiuj foriris estas je katastrofaj kondiĉoj, sed pli malbone estas tiuj, kiuj restis kaptitaj en la okupaciita teritorio. Fakte, laŭ la intenco de Turkio, tiuj 150 000 personoj troas, kaj, laŭ la politiko por forigi ilin, ĉiutage oni ilin suferigas per diversaj humiligoj kaj perfortoj, ke ili forfuĝu.

La informoj donitaj de la funkciuloj de la aŭtonoma administracio baziĝas sur la klarigoj de homoj restintaj en la okupaciita teritorio. Ĉiuj atestoj asertas, ke ili vivas en senĉesa terora kaj timiga stato, pro la agado de la ĝihadismaj bandoj frataj al la turkoj.

Ĝuste tiuj, kiuj iom post iom alvenas el la teritorio okupaciata de Turkio konfirmas realaĵon: ke ili vivas sub la teroro, timante, ke oni ilin arestos kaj forportos, por poste esti torturataj kaj murditaj. La homojn oni murdas antaŭ iliaj familioj, kaj multas la perforto kontraŭ virinoj, oni ilin seksperfortas kaj ilin vestigas per hiĝabo aŭ per vestoj, kiuj ne rilatas al ilia tradicia kulturo.

De Gutao(1) ĝis Afrino.

Inter tiu "nova loĝantaro", kiun Turkio estas instalanta, estas familianoj de la ĝihadismaj dungsoldatoj, ĉefe araboj kaj, ĝis nun, alvenintaj el orienta Gutao – tiu zono proksima al Damasko –, kiun ili forlasis kun la beno de la siria registaro kaj danke al la egoisma perado de Rusio. Ekzemple, laŭ surlokaj informfontoj, oni ĵus translokiĝis el orienta Gutao al la afrina vilaĝeto Kaĥro(4), protektite de la turka armeo; tiuj homoj instalas sin en la domoj kaj teroj de delokigitaj kurdaj familioj. Kaj, laŭ diversaj informoj, multaj aliaj familioj intaliĝis en diversaj vilaĝetoj ĉirkaŭ la urbo Afrino.

Multobliĝas la atestoj pri la terropolitiko: “Oni forkaptas la virinojn kaj knabinojn, kaj la knabojn oni forportas por fosi tranĉejojn; la virinojn oni devigas lavi oniajn vestojn. La virinojn de la vilaĝeto Ŝeĥutko(5) oni forportis, kaj neniam ili revenis. Same okazis al junulino el Ĝindireso(6), kaj ankaŭ alian oni ostaĝis, sed ŝi revenis post semajno, ĉar ŝia edzo estas onia spiono.” Tiel diras ĵus alveninto el tiu teritorio. Laŭ la atesto de B.A., “la turka armeo kaj ties aliancaj grupoj ĉiutage kunigas la virojn sur la vilaĝa placo kaj ilin portas al fosado. Poste, la bandanoj iras de domo al domo seksperfortante la virinojn.”

La okupaciantoj starigis provizoran surlokan administracion de ilia elekto, kaj tiel ili kontrolas la ĉiutagan vivon en la vilaĝetoj. “La membroj de la nova okupacia administracio helpas la armitajn bandojn en nia vilaĝo. Ili nomumis la vilaĝestron kaj kontrolas ĉion, kio okazas en la vilaĝo. Sub ilia inspektado oni forkaptas la virinojn, sed la familioj nenion povas diri, ĉar ili timas.” Tiel asertis rifuĝinto. Alia rakontis sian odiseadon, fugante meze de riskoj kaj ĉantaĝo. “Ni ne povis eliri el Afrino, ĉar ni ne havis veturilon ... Fuĝante, membroj de la SLA(7) rabis al ni po cent mil siriajn lirojn.”

En la rakontoj, oni foje kaj refoje mencias la metodojn de forkapto, torturo kaj ĉantaĝado. Ekzemple, pasintan 10-an de junio en la vilaĝeto Xye oni forkaptis 40 membrojn de la familio Xexo, inklude de infanoj kaj maljunuloj. Dum tri tagoj oni kruele torturis la virojn kaj du virinojn nomatajn Zinet kaj Neriman. Poste, oni liberigis iujn el la virinoj kaj infanoj, sed retenis 25 homojn. Oni postulis 30 000 dolarojn kiel elpago; troa kvanto por iuj simplaj kamparanoj, kiuj vivas el sia laboro. Kaj ĉio ĉi sub la “afabla” rigardo de la turkaj trupoj, kiuj lasas la malpuran laboron en la manojn de la ĝihadistoj.



Laŭ la proparolanto de la aŭtonoma administracio de Afrino, Hevi Mustafa, tiuj sistemaj perfortagoj kaj la situacio okazigita en la tuta teritorio de la turka okupacio bezonas iujn komplacecojn: “La okupacio de Afrino estas la rezulto de obskura pakto inter Turkio kaj Rusio, kiu taŭgas por plifortigi iliajn ekonomiajn interesojn kaj sekurigi la gasodukton, kiu trapasas el Turkio. Samtempe, Rusio volas fortikigi la sirian reĝimon, redonate al Sirio la teritoriojn antaŭe okupitajn de la dungosoldatoj trejnitaj en Turkio. Ni scias nur tion ĉi: ili estas akordantaj pri tiuj teritorioj, tiel nomataj “zono por limigi la konflikton.”

Krom tiu nepra komplaceco, ekzistas multaj komplikaj silentoj: ekzemple, tiu de la damaska registaro, kiu, laŭ Mustafa, “nenion faris, kiam Turkio malrespektis kaj la landlimon kaj la suverenecon de Sirio en Afrino”. Kaj li aldonis tion ĉi: “La reĝimo volis elirigi la dungosoldatojn el Gutaŭ por plivastigi sian kontrolon al aliaj zonoj de Sirio kaj tiel plifortigi sin. Se la reĝimo daŭre silentos, Erdogan okupos pliajn teritoriojn ankaŭ estonte.” Turkio komencis la operacon por invadi Afrinon pasintan januaron, kaj iomete poste la siria armeo komencis rekonkeri Gutaŭn. Turkio efektivigis la okupacion la 14-an de marto.

Okcidento silentas.

Eĉ se estas pro aliaj kialoj – en tiu ĉi kazo, por ne plistreĉigi la ĉiam komplikajn rilatojn kun Ankaro –, rimarkinda estas la silento, kaze de la turka agreso, de la registaroj de la Eŭropa Unio kaj de la ceteraj membroj de la NATO, konsiderante, ke tiu situacio koincidis, en la tempo kaj en Sirio mem, kun la homa krizo en Orienta Gutaŭ. Tiu ĉi krizo, inter aliaj, provokis gravajn disputojn ene de la Konsilio pri Sekureco de Unuiĝintaj Nacioj, diversajn premojn kontraŭ Damasko kaj usonan aeratakon kontraŭ la siria armeo.

En la afrina kazo, tamen, Turkio estas membro de NATO, kaj ĝia estas la dua plej granda armeo de tiu alianco. En la opinio de Mustafa, klaras la fina celo de Erdogan: “Fini la federacian projekton en Norda Sirio. De la komenco de la revolucio en Roĵavo, Turkio estis kontraŭ la memadministrado, kiun ni praktikas. Ĝi manipulis la farojn kaj klopodis refortigi la Islaman Ŝtaton kontraŭ ni, ĉar tiu ĉi estis venkita en multaj lokoj de Norda Sirio.” Li signalus aferon “zorgigan”: ke temas pri “restrukturigo” de la Islama Ŝtato “uzante alian nomon”.



Ĝihadistoj en la urbo Afrino



Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

- (1) Siriaj Demokrataj Fortoj (SDF)/Hêzên Sûriya Demokratîk (HSD).
- (2) Heyva Sor a Kurdistanê.
- (3) Ghouta, en la araba.
- (4) Kaxrê.
- (5) Sêx Êtka.
- (6) Cindirêsê.
- (7) Siria Libera Armeo. Al-Ûayş as-Suri al-Hurr en la araba. Konata ofte per ĝia nomo en la angla: Free Syrian Army.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Jose Miguel Arrugaeta kaj Orsola Casagrande.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 27-an de Junio 2018-a.

Tradukis: NXC. Novembro 2018-a. Provlegis: DS.

